A.E.A.-informilo

Numero 7 Novembro 2009

# Niaj kursoj, niaj kunvenoj…

Inter la taskoj de ĉiu esperantista organizaĵo, por la disvastigado de la internacia lingvo, krom la publika propagando pri ĝi, troviĝas la organizado de kursoj de Esperanto por tiuj, kiuj volas ekkoni la internacian lingvon kaj la okazigado de kunvenoj por tiuj, kiuj, jam lerninte la lingvon, volus praktiki ĝian paroladon.

Nu, por ambaŭ uzoj estas preta nia **ASTURA ESPERANTA ASOCIO** kaj ties sidejo ĉe la Katedro Jovellanos. Ni atentu unue, pri la afero de la kunvenoj. La membroj de nia E-grupo de antaŭlonge perdis la kutimon viziti iufoje la sidejon de la grupo en la kunvenaj tagoj. Tiele la esperantista vivo en la urbo falas kaj malaperas. Oni sciu, do, ke en la nuna kurso oni povas kunveni ĉiumarde kaj ĉiujaŭde de la 6a horo vespere ĝis la sepa kaj duono. Tiuj kunvenoj utilas ankaŭ por ricevi la viziton de foraj geesperantistoj. Sur tiu paĝo estas fotografaĵo de la lasta tiutipa vizito kiun nia E-Asocio ricevis, okazinta en ĉi tiu monato, tiu de du esperantistinoj de **Madrida Esperanto-Liceo**, Lupe Sanz-Bueno kaj Carmen Suárez.



Kaj, kio pri E-kursoj? Por la lernojaro 2009-2010 la klopodo estis duobla. Unue estis la plano de niaj universitataj profesoroj, María José Álvarez Faedo kaj Carlos E. Carleos organizi universitatajn kursojn de Esperanto, unu en Oviedo kaj alia en Gijón, similaj al tiu okazinta en Oviedo antaŭ pluraj jaroj. En la lasta numero de **Heleco**, publikigita antaŭ malmultaj monatoj, estis informo pri tiuj kursoj. Nu, tiuj kursoj ne okazis tial ke neniu universitata student(in)o interesiĝis pri ili. Estas nenio farebla antaŭ la manko de intereso pri la afero. Menciindas tio ke ankaŭ aliaj universitataj kursoj, de aliaj lingvoj, inter ili ankaŭ la angla, devis esti nuligitaj pro manko de gelernantoj.

Aparte de tio, **Astura Esperanta Asocio** planis kurson de la internacia lingvo en sia propra ejo, ĉi-kaze, kompreneble, destinita al ĉiuspeca publiko. Sed, ne nur la gelernantoj de la antaŭaj kursoj ne deziris pludaŭrigi la lernadon sed ankaŭ ne estis novaj gelernantoj.

En kio rilatas al la varbado de novaj esperantistoj pere de lingvo-instruado estas ia problemo kiun ĝis nun ni sukcesis solvi. Temas pri la problemo de la propagando, de la publika informado… Ĉi foje ni intencis alveni al la publiko pere de la presaro. Al ĉiuj amasinformiloj: ĵurnaloj, radio- kaj televid-stacioj de nia urbo, kaj ankaŭ ties de Oviedo, ni sendis, kun la anonco de la nova kurso, artikolon kies teksto oni povas vidi en la sekva paĝo de ĉi tiu **Informilo**. Per tiu teksto oni intencas ekspliki la kialojn por apogi la projekton de internacia lingvo kia Esperanto. Espereble, en urbo kia Gijón, kun ĉirkaŭ 300.000 enloĝantoj, povus kaj devus ekzisti kelkaj sentemaj personoj antaŭ argumentoj kiel tiuj eksponitaj en la menciita teksto. Sed la problemo estas ke neniu el la amaskomunikiloj, al kiuj oni sendis ĝin, publikigis tiun tekston.

Ni ne povas plendi pri la teniĝo de la amaskomunikiloj antaŭ ni. Lasttempe, kaj okaze de la Centjaro de nia E-Asocio, pluraj ĵurnaloj informis pri ni kaj nia Centjaro, kaj ankaŭ du radio-stacioj intervjuis estraranojn de **AEA**. Ni devas danki tion, sed, verdire, tiamaniere nia mesaĝo ne alvenas al la granda publiko.

Ĉu ni kapablos solvi tion kaj pretersuperi tiun malfavoran situacion?